

Heinrich Heine,

Lorelejo

tradukita de Joachim Gießner

Heinrich Heine,

The Lorelei

tradukita de Mark Twain

An ancient legend of the Rhine

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhe-
lo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenza melodi'.

Ŝipiston en eta boato
Turmentas koremoci'.
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo
la ondoj lin kun boat'.
Nun kuŝas li en la profundo
pro Loreleja kantad'.

I cannot divine what it meaneth,
This haunting nameless pain:
A tale of the bygone ages
Keeps brooding through my brain:

The faint air cools in the gloaming,
And peaceful flows the Rhine,
The thirsty summits are drinking
The sunset's flooding wine;

The loveliest maiden is sitting
High-throned in yon blue air,
Her golden jewels are shining,
She combs her golden hair;

She combs with comb that is gol-
den,
And sings a weird refrain
That steeps in a deadly enchant-
ment
The listener's ravished brain:

The doomed in his drifting shallop,
Is tranced with the sad sweet tone,
He sees not the yawning breakers,
He sees but the maid alone:

The pitiless billwos engulf him!-
So perish sailor and bark;
And this, with her baleful singing,
Is the Lorelei's gruesome work.

Heinrich Heine,

Lorelej'

tradukita de Leopold Elb

*Tiu traduko estas poste iom
modifita de aliuloj, ne estas la
origina traduk-versio de Leo-
pold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheligas,
Fluadas la Rejn' en trank-
vil',
La supro de l' monto lu-
miĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizagon kronas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tušas al koro
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur';
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronus finfine
Ŝipisto kun sia boat',
Kaj tion kaŭzis feine
La Loreleja kantad'.

...

...

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: *Josef.Schiffer@t-online.de*), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferrojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)

A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.